

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

Heidi Goes

Peter Grbec

Mireille Grosjean

Maritza Gutiérrez González

Huang Yinbao

Marija Jerkovič

Ilona Koutny

Jozefo Németh


Françoise Noireau

Radojica Petrović

Dima Ševčenko

Bert Ŝuman

Bob Williamson



**ilei**

**NOVAJ VOJOJ DE LERNADO**

**Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

## ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN): .....	3
Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ: <i>Kuba metodo de alfabetigo</i> [...] .....	4
HUANG Yinbao: <i>Lingvoj en dialogo inter Ĉinio kaj la mondo (I.)</i> .....	9
Mireille GROSJEAN: <i>La plezuro instrui (recenzo)</i> .....	13
Heidi GOES: <i>E-instruado en Nederlanda Hindio en la jaroj 1920-1940</i> ...	14
<i>Tute nova situacio</i> (Mireille GROSJEAN) .....	22
<i>Instruado per Duolingo en Slovenio</i> (Peter GRBEC) .....	23
El la landoj kaj sekcioj (FR, HU, CA, HR, PL, RU).....	25
<i>Konferenca temo, 2016: Novaj vojoj de lernado</i> (Radojica PETROVIĈ) ....	35
<i>Aliĝilo por la 49-a Konferenco de ILEI en Nyiregyháza (HU) 2016</i> .....	38
<i>Konferencoj 2017 kaj 2018 (konkurso)</i> (Radojica PETROVIĈ) .....	40
<i>Informoj pri ILEI</i> .....	41

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <[mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Rezentado de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.

**Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <[arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com)>. Universitata agado.

**Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <[emalandan@yahoo.fr](mailto:emalandan@yahoo.fr)>, <[ilei.sekretario@gmail.com](mailto:ilei.sekretario@gmail.com)> Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.

**Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <[lana\\_espero@mail.ru](mailto:lana_espero@mail.ru)>. Lerneja agado. E-centroj.

**Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

**Estrarano:** Radojica PETROVIĈ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>. Konferencoj, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.

**Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <[iecolling@yahoo.com.br](mailto:iecolling@yahoo.com.br)>

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### **Membroj:**

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, LRU,  
Indian Statistical Institute, Kolkata;  
AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Boris Kolker**, Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Stefan MacGill**, Nov-Zelando/  
Hungario, vic-prez. de UEA

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяй-  
ственного Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, MTA  
Nyelvtudományi Intézet

---

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

**Titolpaĝe:** *Nyíregyháza (HU), nia konferencurbo en 2016, atendas vin (vd. p. 35-39.)*

**Dorskovrile:** *Septembraj labor-kunsidoj en Hungario (vd. p. 29-30)*

## *Enkonduko*

### *Karaj legantoj,*

Nia Ligo estas tutmonda kaj religie neŭtrala. Kial do aperas preĝejo sur la emblemo de nia Konferenco? Sur via revuo ĵus ricevita vi vidas la emblemon de nia 49-a Konferenco, kiu okazos en la hungara urbo Nyíregyháza.

La signifo de la nomo de la urbo entenas ideon de kristana preĝejo kaj de betuloj. Pro tio aperas kaj preĝejo kaj betulo en la emblemo. Pro tio ni jam lanĉis la kromnomon „betulejo” por nia konferenca loko.

Eble iam ni havos konferencon en Sankta Barbara en Usono aŭ en Santiago en Ĉilio, ankaŭ kristanaj nomoj; aŭ en iu ĉina urbo kun budhisma signifo... aŭ en la urbo Kōbe en Japanio, kie „kō” signifas „dio” laŭ la ŝintoisma religio. Ni ne povas influu la urbonomojn.

Vidindaĵoj kaj monumentoj abundas en Nyíregyháza, inter ili tiu bela preĝejo sur la kovrilpaĝa foto.

Espereble en Nyíregyháza ni ĉiuj kreskos en niaj konoj kaj saĝeco, kiel betuloj kreskas sur fekunda tero.

*Mireille GROSJEAN*

# Kuba metodo de alfabetigo: sociaj sekvoj en Latinameriko

de Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ (Kubo)



## ENKONDUKO

Unesko agnoskis, ke la internacie proklamita celo por redukti analfabetecon en la jaro 2015 estas nerealegebla, tiel, ke oni alvenas al tiu jaro kun simila nombro da analfabetoj sur nia planedo, tio estas, pli ol 774 milionoj, el kiuj 72 milionoj estas infanoj sen lernejoj, kaj bezonatas pli ol 30 milionoj da tiucelaj instruistoj.

En sia raporto pri apliko de la Internacia Agadplano por la Jardeko de Alfabetigo de UN, laŭ la rezolucio 59/149 de la Ĝenerala Asembleo, la Ĝenerala Direktoro de Unesko deklaris:

„La (kuba) programo „*Mi ja povas*” estas dividata de kelkaj landoj de Latinameriko kaj Karibio por impulsi alfabetigon efikan kaj je malalta kosto. La metodo uzatas en Bolivio, Brazilo, Kubo, Ekvadoro, Grenado, Gvineo-Bisaŭo, Honduro, Meksiko, Mozambiko, Nikaragvo, Nov-Zelando, Paragvajo, Peruo, Dominika Respubliko, Sud-Afriko, Orienta Timoro kaj Venezuelo. Ĝi kombinas edukadon distancan kaj ĉeestan instruadon kun personigita karaktero”.

Sendube la noveca alfabetiga metodo „*Mi ja povas*”, kreita en la jaro 2000, nuntempe uzata, baziĝas esence sur aŭdvida materialo; ĝi gajnis la internacian premion de edukado Reĝo Sejong de Unesko en la jaro 2006. La sistemo faciligas solvon de universala problemo por tiuj landoj kun la plej granda nombro da analfabetoj, tio estas manko de instruantoj, eĉ por alfronti la elementan edukon. Alfabetigo per radio-kaj-televido estas edukaj formoj profitdonaj, ĉiam kiam oni prikonsideru, dum la tuta procezo alfabetiga, la organizon, planadon, kontrolon kaj taksadon.

## La lernolibro „*Mi ja povas*”

Kreita de la kuba profesorino Leonela Relys, tiu ĉi metodo iras de konataĵoj (ciferoj) al nekonataĵoj (literoj) kaj baziĝas sur sperto. Temas pri integriga

metodo konsistanta el tri etapoj: trejnado; instruado lego-skriba kaj pli-firmigo.

Ĉiu leciono havas ĝeneralan karakteron, tial oni rekomendas, ke la partoprenantoj unue observu ĝin komplete. La baza tenilo de la instruado por lego-skribo estas aŭdvida instrumento kombinata kun lernolibro, kiu sekvas la vojon de tri simboloj: orelo-okulo (aŭskulti vidi), orelo-libro (aŭskulti legi), orelo-skribilo (aŭskulti skribi).

La koncepto prezentata de tiu alfabetiga metodo iras preter la simpla akirado de kapabloj kaj ecoj en scipovado de literoj kaj ciferoj, tial, ke ĝi ankaŭ celas plibonigon de la funkcioj bezonataj ĉiutage en la normala homa vivo (funkciiva) kaj kresko de konsciiĝo kapabla transformi la homan vivon kaj agadon (konsciiiga).

Temas pri konceptado kun integrada karaktero, favoranta konstantan dialogon (dialogiko); oportunan cerbumadon fronte al temoj kaj situacioj objektivaj kaj subjektivaj (cerbuma), kaj faciliganta debaton kaj diskutadon (problemiga).

En ĉiu leciono oni pritraktas tre interesajn temojn surbaze de la plej komunaj bezonoj de la regiono: sano, familia kunvivado, atento al maljunuloj, konservado de la naturo kaj medio, historio kaj kulturo de niaj popoloj, i.a.

En tiaspeca organizado de alfabetigo la televido iĝas la ĉefa dissendanto de la starigita koncepto kaj konsistigas bazan tenilon de la tuta procezo instru-lerniga.

## **Alfabetigo per televido**

### *I. Etapoj de la instrumentado lego-skriba:*

Trejnado: ĝi inkluzivas la unuajn 10 lecionojn de la metodo, el kiuj la unuaj kvin ebligas familiariĝon, evoluigon de parola esprimo kaj kapabloj psiko-motoraj; kaj certigon de skriba cifere-reprezento inter nulo kaj trideko. La aliaj kvin lecionoj celas vokal-lernadon.

Lernado de lego-skribado: ĝi inkluzivas 42 lecionojn. En la unuaj 23 lecionoj oni lernas ĉiutage novan literon aŭ fonemon. En la ceteraj 19 lecionoj oni enkondukas la malfacilaĵojn prezentatajn de la koncerna lingvo.

Plifirmigo: la celo estas fiksi konataĵojn, certigi ĉion lernitan en difinitaj momentoj kaj kontroli, ĝis kiu punkto oni bone lernis. Ĝi enhavas 11 lecionojn plus lastajn du pri redaktado; plifirmigi la lernitaĵojn surbaze de la skribsignoj per ludoj, kaj evoluigi la skribadon kaj komprenan legadon ĝis tre elementa nivelo.

La rolo de la faciliganto devas centriĝi en tiuj konoj bezonataj kaj doni iaspecan klarigon petatan de la lernantoj cele al plifirmigo de la diversaj skribaj ekzercoj.

## *II. Ĉeesta renkontiĝo*

Tre gravas, ke ĉiu faciliganto bone konu la partoprenantojn kaj sciu, kiel helpi ilin; pro tio oni devas taŭge klasifiki la lernantojn:

1. pure analfabetaj: personoj, kiuj neniam vizitis lernejon.
2. duon-analfabetaj: personoj, kiuj iam vizitis lernejon, ankaŭ inkluzivendas personoj, kiuj rekonas la literojn kaj scipovas skribi kelkajn vortojn.
3. Specialaj analfabetoj: personoj kun edukaj bezonoj specialaj kaj tiurilate oni devas prikonsideri fizikajn handikapojn.

## *III. La lernolibro „Mi ja povas”*

Ĝi prezentas saman formaton en ĉiu paĝo kaj oni ĝin konceptis surbaze de rekta ligo inter ciferoj kaj literoj, tiel, ke la lernanto starigu asociadan procezon inter la konataĵoj (ciferoj) kaj nekonataĵoj (literoj). Tio signifas, ke en la lernolibro oni donis al ĉiu litero numeron.

En la centro de la lernolibro aperas tabulo, kiu celas resumi ĉiujn literojn aŭ fonemojn lernitajn, por ke la lernanto plenumu la taskojn en ĉiu ekzerco indikitajn plej facile kaj rapide.

En la lasta paĝo de la lernolibro oni enmetis kelkajn kombinojn triliterajn aŭ eĉ plimultliterajn, ankaŭ konatajn kiel miksajn silabojn. La spacoj signifaj per krajono en la lernolibro celas, ke la gelnantoj skribu, sed ne sufiĉas, do oni devas uzi aldonan kajeron.

Estas esence, ke la faciliganto laboru en la ekzercigado, por evoluigi kapablojn psikomotorajn, antaŭviditajn en diversaj paĝoj tiucelaj aŭ per fizika ekzercado subĉiela.

Oni instruas 65 'horojn': lecionojn dum po 30 minutoj kvinfoje semajne. La partoprenantoj ricevas lernolibron senpagan, kombinantan ciferojn kaj literojn plus la agadon de la faciliganto. La lecionoj ankaŭ donas informan enhavon kontribuante al kono de kulturaĵoj kaj kresko de la kultura nivelo de la lernantoj. La tuta lerno-procezo en la unua etapo, lego-skriba, daŭras tri monatojn. La evoluigitaj metodoj estas eklektika, miksa, kunmetita aŭ ĉioenhava; oni ankaŭ uzas teknikojn kaj procedojn aŭd-vidajn kaj motorajn en kombino kun analizo kaj sintezo.

### **Sekvoj en ĉefe Latinameriko**

Tiu ĉi metodo estis unue aplikata en Haitio, Nikaragvo, Nov-Zelando, Salvadoro, Honduro, Mozambiko kaj en Venezuelo, kies rezultoj estas nekontesteblaj. Oni adaptis ĝin por uzo en Paragvajo en la gvarania lingvo kaj ekis en Meksiko en la ŝtato Michoacán; en Haitio pro la konkretaj cirkonstancoj de la lando oni aplikis la metodon per radio. En Bolivio oni ĝin aplikas ankaŭ en la keĉua kaj ajmara lingvoj, dum ankaŭ en Nikaragvo oni ĝin enkondukis ne nur en la hispana lingvo sed ankaŭ en lokaj lingvoj.

*Jen kelkaj statistikaj datumoj de la jaro 2007:*

LANDOJ	FACILIGANTOJ	ALFABETIGITOJ
Argentino	1 500	9 500
Venezuelo	101 000	1 482 543
Bolivio	22 153	106 546
Honduro	827	9 014

Inter la jaroj 2005 kaj 2007 en Argentino kreiĝis pli ol 400 alfabetigaj centroj, kie studas kelkaj miloj da personoj; en Nikaragvo estas alfabetigitaj pli ol 70 000 personoj; en Venezuelo ĝi funkcias sub la regado de la tiel nomata Misio Robinson, kiu transiris al superaj etapoj; en Honduro partoprenis en la programo pli ol 10 000 personoj, post kio pliaj cent miloj aliĝas iom post iom laŭ la planoj; en Gvatemalo jam estis alfabetigitaj dekomence pli ol milo da personoj kaj oni ĝin etendis tra 11 komunumoj. En Meksiko jam alfabetiĝis pli ol 204 160 personoj kaj dume en Ekvadoro reduktiĝis la indico de analfabetoj de 11,9% ĝis 3,9% tial, ke jam estas alfabetigitaj pli ol 37 500 personoj. Ankaŭ landoj kiel Kanado kaj Hispanio interesiĝis pri utiligo de la kuba programo.

## RESUMO

### *Faktoj kaj perspektivoj*

La kuba Latinamerika kaj Kariba Instituto Pedagogia (IPLAC) estas institucio de supera edukado kun sidejo en Havano, kies rolo estas vastigi la rezultojn de la insula edukado je internacia skalo, impulsi la sciencajn kaj akademian rilatojn kun institucioj landaj kaj eksterlandaj kaj kontribui al pliklerigo de instruistoj kaj profesoroj de la regiono per diversaj formoj de postdiploma eduko.

La katedro de Alfabetigo kaj Edukado por Gejunuloj kaj Adoltoj de tiu instituto disponas pli ol 400 fakulojn preparitajn por asesorado kaj kontrolado de alfabetigaj projektoj per radio kaj televido.

Pro la fakto, ke ekzistas landoj, kie regas altaj indicoj de analfabetismo kaj bezonatas evoluigi kursojn postsekvajn, Kubo proponis tiujn kursojn aplikeblajn eksperimente aŭ teste, en komunumoj, kaj poste ampleksigi ilian aplikon al regiono aŭ tuta lando. Tiamaniere ĝi evoluadis tra dudeko da landoj.

La alfabetigaj programoj per radio kaj televido, laŭ konkretaj cirkonstancoj kaj laŭ landoj, plenumis la celon kontribui al la redukto de analfabeteco kaj faciligi aliron al elementa kaj permanenta edukado, celo kolektive akceptita en la Kadro de Aktoj de Dakaro, kaj en la interkonsentoj de la Konferenco de Ministroj de Cochabamba, Bolivio, en tiu ĉi kampo.

Pli ol tri milionoj da personoj en 28 landoj lernis legi kaj skribi per tiu ĉi metodo – kaj la nombro daŭre kreskas – kiu transdonas metodologion kun plena respekto al la originaj lingvoj de la komunumoj, kie ĝi funkcias. La kurso havas versiojn en 12 lingvoj, inter ili la gvaranian, keĉuan, ajmaran. Danke al tiu ĉi programo landoj kiel Bolivio kaj Venezuelo sin deklaris teritorioj liberaj je analfabetismo.

Kiel parto de la novaj perspektivoj kreitaj pro la pozitivaj rezultoj de la alfabetiga metodo la kuba instituto IPLAC proponis daŭrigan programon nomatan „Mi ja povas plu”, kies apliko komenciĝis en Venezuelo kun la celo doni kontinuecon al la alfabetiga procezo. La nuna programo ebligas plifirmigi la lernitaĵojn kaj avanci ĝis la kvara grado de la elementa edukado. Alia celo estas eduki homojn lerni sendepende kaj konstante kaj konsciigi ilin pri la civitana identeco per lernado de kulturo kaj historio de la propra lando.



Sendube restas obstakloj kaj la kubaj fakuloj daŭre pritaksas la realigon kaj funkcipovon de la programo, adaptas ĝin laŭ la konkretaj kondiĉoj de la diversaj landoj kaj postsekvas ĝin konstante. La alfabetiga programo konsistigas parton de interkonsentoj inter la diversaj landoj kaj estas aparte impul-sata de la regiona integrada projekto konata kiel Alianco Bolívar por la Amerikaj Popoloj (ALBA), iniciatita de Venezuelo. Ĝi daŭre havas subtenon de Unesko tial, ke la programo plene kongruas kun la celoj de tiu ĉi internacia institucio cele al reduktado de analfabetismo sur nia terĝlobo.

### **Bibliografiaj referencoj**

1. CEDES. Centro de Estudios para Desarrollo Sociocultural. El método cubano de Alfabetización, 2007.
2. Boletín U.M.M.E.P. Argentina. Campañas de Alfabetización.
3. IPLAC. Alfabetización por radio y televisión. Leonela Relys
4. Castañeda Yáñez, Margarita: Los medios de comunicación y la Tecnología Educativa. México, Ed. Trillas, 1985.
5. Coordinación Nacional Programa de Alfabetización, Bolivia, 2007.
6. Misión Robinson Yo si puedo, Venezuela.

## **Lingvoj en dialogo inter Ĉinio kaj la mondo<sup>1</sup> (parto I.)**

de *HUANG Yinbao* „Trezoro” (Ĉinio)

### **1. La mandarena lingvo**

En la ĉina lingvo „Ĉinio” signifas „centran landon”. En la antikva Ĉinio sen bona konscio pri la mondo, ĉinaj prauloj opiniis, ke Ĉinio estas la centro de la tuta mondo, ke ĉiuj aliaj landoj estas ĉirkaŭaj kaj flankaj, ke la ĉina reĝo estas la reĝo de la tuta mondo.

Dum longa tempo, najbaraj landoj ofte sendis bovojn, ŝafojn, vestaĵojn kaj bongustaĵojn por flati ĉinajn reĝojn. Por bone komuniki kun la reĝoj, ili devis lerni la mandarenan lingvon. La mandarenoj opiniis, ke Ĉinio kiel la centra



---

<sup>1</sup> Prelego el la Simpozio „Lingva justeco kaj paco – kiuj defioj por la nuna mondo”, Oostende, 23-24 julio 2015

kaj kiel la plej grava lando plej verŝajne ne bezonas lerni fremdajn lingvojn, kaj la najbaraj landoj devas lerni la mandarenan lingvon. Tial la mandarena lingvo estis la oficiala dialoga lingvo inter Ĉinio kaj la mondo.

## 2. La latina lingvo

Antaŭ 300 jaroj Rusio ofte agredis Ĉinion. Ĉinio foje sukcese forpelis la rusan armeon, tamen post nelonga tempo la rusa armeo denove agredis, foje kaj refoje. Ĉina reĝo ege ĉagreniĝis pro tio.

En 1672 kristanoj, nome la portugalo Thomas Pereira (1645-1708) kaj la franco Joan Franciscus Gerbillon (1654-1707), vojaĝis al Ĉinio por distavasti kristanisman. Ili scipovis muzikon, matematikon, fizikon, la rusan lingvon, latinan lingvon kaj ĉinan lingvon. La ĉina reĝo Kanĝi ĝoje akceptis ilin kiel servajn oficistojn. Ili poste grave rolis en la ĉina historio, ĉar ili kapablis paroli la ĉinan, rusan kaj latinan lingvojn.

En 1686, la ĉina armeo sukcese forpelis la rusan armeon, okupis la urbon Nepĉu kaj minacis regi pli vastan teron de Rusio. La rusa armeo plene malvenkis kaj proponis fari traktaton kun Ĉinio por ĉesigi la militon. Ĉinio ne kredis la promeson de Rusio, ĉar Rusio multfoje malplenumis siajn promesojn. Ĉinio finfine akceptis proponon de la kristanoj Thomas kaj Franciskus konsenti fari traktadon kun Rusio.

La 7-an de septembro 1689, Ĉinio kun Rusio faris traktaton en Nepĉu (la nuna urbo Nerchinsk de Rusio). La reĝo ordonis, ke la du kristanoj Thomas kaj Franciskus faru tradukadon por la ĉina flanko, ĉar la ĉinaj ambasadoroj ne komprenis la rusan lingvon. Rusio kaj Ĉinio preparis la traktaton aparte en la rusa kaj la ĉina lingvoj. Tamen la ĉinaj ambasadoroj subskribis nur la ĉinlingvan traktaton, sed rifuzis subskribi la ruslingvan traktaton, ĉar ili timis, ke la ruslingva dokumento malsamas de la ĉinlingva versio. Tiuokaze la du kristanoj preparis dokumenton en la latina lingvo. Finfine la ambasadoroj de la du flankoj kune subskribis nur la traktaton en la latina lingvo. Fakte la ĉinaj ambasadoroj tute ne komprenis la enhavon de la traktato en la latina lingvo.

Laŭ la traktato, Rusio promesis ne plu agresi Ĉinion; Ĉinio retiris la armeon kaj donacis al Rusio pli vastan teritorion. La ĉina reĝo ege ĝojis pro la sendanĝerigo de la rusa armeo kaj premiis la du kristanojn. La latina lingvo rolis

kiel ununura neŭtrala lingvo unuafoje en dialogo inter ĉina registaro kaj la mondo. Ekde tiam, la du kristanoj kuraĝe disvastigis kristanismon tra Ĉinio.

Post 7-8 jaroj, la du kristanoj mortis unu post la alia. La ĉina registaro rimarkis, ke Rusio subaĉetis la du kristanojn. En la traktado ili trompis la ĉinajn ambasadorojn, kiuj komprenis nek la rusan lingvon nek la latinan lingvon. La ĉina registaro poste decidis starigi ruslingvan lernejon por eduki proprajn tradukistojn ekde 1708.

En 1862 la registaro starigis Ĉefurban Komunlingvan Lernejon (ĉine: Jingshi Tongwen Guan). Po ĉirkaŭ 60-120 lernantoj jare lernis la rusan, francan, germanan kaj japanan lingvojn en la lernejo dum 40 jaroj. En 1902 la registaro starigis Ĉefurban Altlernejon (ĉine: Jingshi Taxuetang – nuntempa Pekina Universitato). Dum longa tempo la lingvaj lernejoj aŭ la altlernejoj instruis fremdajn lingvojn ĉefe al oficistoj de la registaro por trejni tradukistojn.

### **3. La japana lingvo**

En 1931 la japana armeo agesis Ĉinion; Japanio postulis, ke la ĉinaj lernejoj okupitaj de la japana armeo devige instruu la japanan lingvon. La japana lingvo estis perforte decidita kiel la oficiala lingvo de la regiono „Manzhuguo” en nordorienta Ĉinio regata de la japana armeo. Japanio esperis, ke la japana lingvo rolos kiel la azia lingvo aŭ la unua lingvo en Azio. Multaj lernejoj devige lernis la japanan lingvon. La lerna tempo de japana lingvo en elementa lernejo superis tiun de la ĉina lingvo. Post la retiro de la japana armeo el Ĉinio, la lernejoj ĉesis instruadon de la japana lingvo kaj la regiono de la tiel nomata „Manzhuguo” rifuzis uzi la japanan lingvon.

### **4. La rusa lingvo**

Post la starigo de Ĉina Popola Respubliko gvidata de la komunista partio Sovetunio kiel la ĉefo de la komunista mondo arde kaj miele amikiĝis kun Ĉinio. Ĉinio rigardis Sovetunion kiel modelon de la venonta Ĉinio. Amaso da ĉinoj veturis al Sovetunio por studi marksismon, leninisman, komunisman, sciencan, teknologian, kulturan kaj metodon konstrui idealan komunisman landon. Kaj Sovetunio favore sendis multajn specialajn fakulojn por helpi Ĉinion. Dume Ĉinio ege bezonis ruslingvajn parolantojn. Multaj lernejoj komencis instrui la rusan lingvon kaj multaj homoj komencis lerni la rusan lingvon. Oni fieris pro tio, ke ili kapablas paroli kelkajn rusajn

vortojn. La rilato inter la du landoj atingis rekordan intiman amikecon, same kiel geedzoj en la mielperiodo.

Post la finiĝo de la miela periodo, Sovetunio retiris la specialajn fakulojn el Ĉinio kaj Ĉinio retiris la studentojn el Sovetunio. Ĉinoj perdis intereson al Sovetunio kaj pri la rusa lingvo. Multaj lernejoj ĉesis instrui la rusan lingvon.

## 5. La angla lingvo

En la 80-aj jaroj, post reformado kaj pordmalfermo, gvidita de la ĉina ŝtata eksgvidanto S-ro Deng Xiaoping, Ĉinio deziris komuniki kun la mondo, proksimiĝi kaj amikiĝi kun la fortaj landoj, kiuj aŭ parolas la anglan lingvon aŭ favoras la anglan lingvon. Ĉinio esperis lerni modernajn sciencojn kaj teknologiojn kaj vendi ĉinajn varojn al fremdaj landoj. Oficialaj parolistoj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Ĉinio komencis uzi la anglan lingvon en gazetaraj konferencoj. Kaj la registaro eldonis ĵurnalojn en la angla lingvo. Preskaŭ ĉiuj lernejoj komencis instrui la anglan lingvon. Ekster lernejoj aperis amasoj da kursoj pri angla lingvo. Kelkaj tre konataj instruistoj de la angla lingvo kiel Chen Lin, Xu Guozhang kaj Li Yang iam fariĝis steluloj eĉ pli konataj ol belegaj filmaj stelulinoj. Ili ne kuraĝis promeni surstrate, alie ili estus sieĝataj de prianglalingvaj interesatoj. Se junuloj ne lernis la anglan lingvon, ili ne rajtis viziti bonajn lernejojn, kaj ili kompreneble perdis ŝancon eniri en altlernejojn. Studentoj malsukcesintaj en la ekzameno pri la angla lingvo en universitato ne povus glate diplomiĝi, magistriĝi kaj doktoriĝi, ricevi bonajn postenojn post diplomiĝo.

Kaj poste oni rimarkis, ke plejparto de la lernantoj de la angla lingvo fakte kapablas nek skribi, nek paroli, kaj la lingvo por ili estas tute senutila. La plendo kontraŭ instruado de la angla lingvo tagon post tago kreskas. Aperis multaj artikoloj kontraŭ la angla lingvo. Oni rimarkis, ke fakte multaj lernintoj de la angla lingvo ne rilatas kun la angla lingvo dum la tuta vivo.

Iam la Miyun-Gubernio en Pekino lanĉis projekton por konstrui „Angla-lingvan Urbon” en Pekino. Laŭ la projekto ĉiuj homoj, kiuj volas eniri en la urbon, bezonas specialajn „pasportojn” kaj nur anglalingvaj parolantoj rajtas havi la pasporton. Tio signifas, ke ordinaraj ĉinoj, kiuj parolas nur la ĉinan lingvon kaj ne kapablas paroli la anglan lingvon, ne rajtas eniri en la urbon. Post la publikigo de la projekto tuj aperis dekmil diversaj kontraŭaj voĉoj el diversaj ĵurnaloj kaj retejoj. Multaj homoj telefone demandis la registaron por esprimi kontraŭajn vidpunktojn. Ankaŭ mi telefone vokis, tamen mi ne

sukcesis, ĉar la telefono estis blokita de amaso da alvokantoj. Post kelkaj tagoj la oficialaj parolistoj de la gubernia registaro deklaris nuligon de la projekto laŭ la proponoj de la civitanoj. La projekto estis pinta ago perforti ĉinajn popolanojn per la angla lingvo.

(daŭrigota)

## La plezuro instrui


### Nova maniero rigardi la instruistan profesion

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Kebekio estas avangarda regiono. Francparola parto de Kanado, la plej granda provinco de tiu nordamerika Ŝtato, ĝi etendiĝas sur giganta teritorio norde de la riverego Saint-Laurent (Sankta Laŭrenco). Montrealo estas la kvara plej granda franclingva urbeo post Parizo (Francio), Kinshasa (DR Kongo) kaj Abidjan (Ebur-Bordo).

En Romandio (la franclingva parto de Svislando) en la kampoj de homaj sciencoj kaj edukado ni ofte aŭdas pri novaj tendencoj, kuraĝaj analizoj, interesaj malkovroj el Kebekio. La lertigistoj rekomendas kebekdevenajn teknikojn arde kaj elkore. Ĉu en Francio kaj aliaj franclingvaj landoj okazas la samo, mi ne scias.

Jen tre interesa libro el Kebekio: „La Plezuro Instrui” (fr: *le plaisir d’enseigner*) de Pierre-Yves Boily, eldonejo Stanke, eldonjaro 1990. Tiu libro estas ne nur interesa, sed amuza kaj kuraĝiga, ĉar ĝi estas pozitiva. Instruisto legante ĝin trovas novan energion kaj freŝan motivon, komprenante la situacion, la faktorojn kaj aspektojn de sia profesio. El tio la instruisto komprenos, kio eblas kaj kio ne eblas. Laŭ Boily instruado estas samtempe arto, scienco kaj tekniko. Instruado ligiĝas al kulturo, sperto kaj kapablo. Ĉirkaŭ la lernejoj ĉio evoluas: la studobjekto, la socio, normoj,



atendoj, etiko, iloj... Konsekvence la instruisto devas daŭre adaptiĝi, kiel li aŭ ŝi devas daŭre adaptiĝi antaŭ klaso, eĉ se la gramatikaj eroj instruendaj estas ĉiam la samaj.

Ĉirkaŭ la instruado cirkulas stereotipoj, kiel „por instrui la anglan al Karlo, vi devas koni... la anglan? aŭ Karlo-n? aŭ la instruarton?” Boily respondas: ĉiujn tri. La instruisto konu Karlo-n, tamen li aŭ ŝi havas samtempe 20 aŭ 30 da Karlo-j antaŭ si; ĉiu lernanto „sidas” en sia aĝo, emoj, atendoj, timoj... Kiel trovi adekvatan tonon por ekrilati kun ĉiuj kaj motivi ĉiujn? Laŭ la franca verbo *connaître* (koni), kiu fakte signifas naskiĝi kun, Boily montras la gravecon de intima kunvivado kun la gestudentoj, el diroj, eventoj, emocioj, sentoj, kaj finfine amo. Se tio okazas, la instruisto trovos... la plezuron instrui. Tiuj tri vortoj aperas fine de ĉiu ĉapitro de tiu atentokapta libro.

Jen ekzemplo, kiu restis en mia memoro post la legado de la libro. Bonvole konsideru la laborkondiĉojn de iu kantisto el la spektakla mondo, el „*show business*” stelulo, stelulino mondfama kaj riĉega: li aŭ ŝi kantas ĉiun vesperon la saman programon antaŭ nova publiko; instruisto aperas ĉiun tagon antaŭ la saman publikon kaj devas ĉiun tagon prezenti novan programon. Se iu komparas, instruisto evidente malvenkas. Alia aspekto de tiu komparo: la artisto kantisto havas buĝeton por siaj vestoj... la instruisto ne. Se vi kapablas legi la francan, nepre provu trovi tiun libron kaj legi ĝin de a ĝis z. Ĝi ne plu aĉetebblas, sed vi trovos ĝin en bibliotekoj.

## E-instruado en Nederlanda Hindio en la jaroj 1920-1940

de *Heidi Goes (Belgio)*

### Enkonduko


Ĉu vi scias, ke jam en 1928 en la nuna Indonezio, la tiama Nederlanda Hindio, la estraro de la Nederland-Hindia Societo por Instruistoj (NIOG) akceptis la jenon rilate al Esperanto: La NIOG, rekonante la grandajn avantaĝojn, kiujn ĝi kiel internacia helplingvo proponas super vivanta lingvo, provas kiel eble plej



rapide realigi ĝian enkondukon en la lernejojn, komencante ĉe la lernejoj por instruistoj kaj la lernejoj de pli alta edukado. La deklaro ne havis la atendatajn sekvojn, kaj naŭ jarojn poste simila propono estis akceptita, ankaŭ sen gravaj sekvoj. Tamen, pro tio, ke multaj esperantistoj estis instruistoj, la lingvo estis instruata en pluraj lernejoj, jam en la 20-aj jaroj sed precipe en la 30-aj jaroj. Ekde junio 1936 okazis ankaŭ oficialaj E-ekzamenoj, organizitaj de la tre aktiva klubo de Malang, Java. Pri tio raportis eĉ ne-esperantaj gazetoj en la lando; Poste ankaŭ la *Nederlandindia Societo Esperantista 'La Estonteco Estu Nia'* fondis ekzamenkomisionon, kiu organizis ekzamenojn. En la sama periodo aperis longaj kursoj en ne-esperantaj gazetoj kaj disaŭdiĝis lecionoj pere de kelkaj radio-stacioj. La multaj ĉeestaj kursoj ĉe kluboj, organizaĵoj kaj simile ne estos pritraktitaj en ĉi tiu artikolo, kiu estas pli-malpli la transskribo de la prelego de la aŭtoro dum la ILEI-Konferenco en Oostende (20/7/2015). Multe pli da detaloj aperos en ŝia libro pri la historio de la E-movado en Indonezio.

## 1. Kursoj en gazetoj

*De seinpaal* estis la monata organo de la unuiĝo de eŭropanoj laborantaj ĉe la nederlanda fervoja firmao *Deli Spoorweg Maatschappij*<sup>2</sup> kaj eldonita en Medan de post la fondiĝo de la unuiĝo la 19-an de aŭgusto 1919 ĝis 1932.<sup>3</sup> La kurso aperis 6 fojojn kaj konsistis el po 2 paĝoj. Dum la jarkunsido, la 18an de aŭgusto 1922, iu membro de la unuiĝo petis, ke oni anstataŭigu tiun kurson per kurso de la malaja kaj java lingvoj.<sup>4</sup> En la sekva numero de la organo la sama peto aperis. La membro, kiu verkis tiun peton, aldonis ke Esperanton li ja taksas utila, sed ke en Hindio, kun malmulte da trafiko, la malaja aŭ java lingvo estos pli utilaj.<sup>5</sup> Oni ja povas miri, ke en organo de unuiĝo por eksterlandaj laboristoj aperis pli frue kurso pri E-o ol pri la gravaj enlandaj lingvoj.



<sup>2</sup> Vereniging van Europeesch personeel in dienst bij de Deli Spoorweg Maatschappij.

<sup>3</sup> *De Sumatra post* (1919) kaj *Het nieuws van den dag voor Nederlandsch-Indië* (1932).

<sup>4</sup> *De Sumatra post* (1922a),

<sup>5</sup> Laŭ mencio en *De Sumatra post* (1922b).

La kurso en *Neratja*, verŝajne la unua en la malaja lingvo, estis ebla danke al la penoj de J. Kaptein, P.W. van den Broek kaj Albert Knegt.<sup>6</sup> P.W. van den Broek, kiu uzis ‘Esperantist’ kiel sian pseŭdonimon, verkis ĝin. Post enkonduko la 31-an de julio, la sekvaj lecionoj aperis de la 17-a de aŭgusto 1922 ĝis majo 1923 kun malregula intervalo. La sola persono kiu faris la ekzamenon post la lecionoj estis la javano Kamsu Wirjosaksono.<sup>7</sup> Tamen Wirjosaksono ne jam bone konis la lingvon post ĉi tiu kurso, ĉar post la foriro de Van den Broek, J.T. Kaptein devis pluinstrui al li. Tio malfacilis, ĉar la lernanto ne parolis la nederlandan, kaj la instruisto ne la malajan.<sup>8</sup>

En la fakrevuo *Het Middelbaar Onderwijs* por la instruistoj en la mezlernejo en 1927 aperis 4 lecionoj. Temis precipe pri enkonduko pri Esperanto.

Pri kelkaj lecionoj aŭ kursoj ni nur scias pere de mencioj en aliaj revuoj, kaj ni ne trovis la lecionojn mem. Ekz.: Laŭ sciigo en *Hinda Esperantisto*, Wirjosaksono enmetis ekde januaro 1931 E-leciono(j)n en la gazeto *Warta Fiag* (9-a numero).<sup>9</sup> Ni ne nur ne retrovis tiujn lecionojn, sed ankaŭ ne retrovis eĉ la revuon *Warta Fiag* ie ajn en la reto. Povus esti ke la revuo aperis tiom mallonge ke ĝi nenie konserviĝis. *Berita Baroe* aperis en Makassar, Celebeso, kaj laŭ informoj en *La Praktiko* publikigis en 1934 E-kurson.<sup>10</sup> *La Sperto* iom poste sciigis ke la sama gazeto publikigis artikolon pri E-kurso en la urbo.<sup>11</sup> Nenie alie pli precizaj informoj haveblas kaj ni ne sukcesis mem kontroli la gazeton. La 8an de oktobro 1936 la gazeto *Pewarto Borneo* rekomendis E-kurson kaj dissendis specimenan lecionon. Temas pri la „grandsukcesa koresponda kurso de la 'Centra Esperanta Propaganda Komisiono'” en Nijmegen, kiu havas ĉiujare plurajn milojn da lernantoj, kaj estas enkondukita ankaŭ en Nederlanda Hindujo, sub la administrado de Lim Ek Thoean en Samarinda.<sup>12</sup> En la gazeto *De Malanger* aperis 25 lecionoj, po unu semajne de la 18a de januaro ĝis la 12a de julio 1938.<sup>13</sup> Ili aperis ĉiam

---

<sup>6</sup> *Holanda Esperantisto* (1922).

<sup>7</sup> *Holanda Esperantisto* (1924), Kaptein (1923), *Esperantist* (1923).

<sup>8</sup> *Holanda Esperantisto* (1924).

<sup>9</sup> [Liem] (1931).

<sup>10</sup> *La Praktiko* (1934).

<sup>11</sup> *La Sperto* (1935).

<sup>12</sup> *La Praktiko* (1936).

<sup>13</sup> Mencioj en *Bataviaasch Nieuwsblad* (1938a), *Het nieuws van den dag voor Nederlandsch-Indië* (1938), *Nia Organo* (1937b, 1938a). La lecionoj mem en *De Malanger* (1938a-1938u).



en mardo, prepare al la radio-kurso kiun oni dissendis en merkredo. La lecionoj taŭgis ankaŭ por memstudo. La verkanto de la lecionoj estis L. Schoutens, de la aktiva Malanga Esperanto-klubo. En la lastaj lecionoj de la serio, Schoutens instigis la kursanojn ekpartopreni la movadon: en la 22a leciono la kursanoj estis invititaj por ĉeesti la morgaŭan kunvenon de la Malanga Esperanto-klubo, kiu festis tiam sian 3-jariĝon. Enkonduke al la sekvaj du lecionoj li instigis la kursanojn membriĝi al la Malanga Esperanto-klubo, kaj sciigis la avantaĝojn de tiu membreco.



*Heidi en la Nacia Biblioteko Den Haag (Hago) (NL)*

## **2. Radio-paroladoj kaj -kursoj**

Dissendiĝis paroladoj kaj kursoj en lokaj kaj nacia radio-stacioj. La koncesio de NIROM (Nederlandsch-Indische Radio-omroepmaatschappij, Nederland-hindia Radio-elsendkompanio) eksplicite sciigis pri la rajto elsendi „en la nederlanda, angla, germana aŭ franca lingvo, en Esperanto aŭ iu alia monda artefarita lingvo, aŭ en la kutime en Nederlanda Hindio uzataj enlandaj aŭ orientaj lingvoj”. Kompreneble estis iom strange, ke oni eksplicite menciis Esperanton, sed nenium konkretan ‘enlandan’ lingvon. La unua parolado pri

Esperanto verŝajne estis tiu de G. Seubring la 24an de majo 1932 ĉe *Bandoengsche Radio Vereeniging*.

De la 12a de julio 1936 ĝis la 7a de marto 1937 okazis ĉiusemajne ‘Esperanto-duonhoro de G.H. De Heer’ ĉe *Bataviasche Radio Vereeniging* (1933), aŭskultebla en Batavia. Povus esti, ke ĝi dissendiĝis ankaŭ en *Soerabaiasche Radpetataio-Vereeniging*. Malangsche Radio-vereeniging (1935): minimume en julio, aŭgusto, septembro okazis monata parolado pri E-o. La 4an de aŭgusto 1935 la katolika radio-elsendo, KRO, kiel parto de PHOHI, uzis parton de sia elsendhoro (21a40-22a40) por parolado pri E-o.<sup>14</sup>

De 23/6/1936-2/2/1937 ĉe *Bandoengsche Radiovereeniging* dissendiĝis dusemajnaj kursoj gvidataj de G. Seubring. Ĉe NIROM okazis parolado de S.J. IJselstein la 25an de junio 1937, kiu estis aŭskultebla tutlande kaj eĉ pli for. Oni esperis, ke tio estus komenco de kurso, sed NIROM rifuzis tion.

*Malangsche Radiovereeniging* okazigis de 12/1-13/7/1938 ĉiusemajnajn lecionojn, gvidatajn de L. Schoutens (lige kun la gazetaj kursoj, vidu ĉe De Malanger supre), aŭdeblajn ne nur en Malang sed ankaŭ en Surabaya kaj Ponorogo. Ekde 4/10: konversaciaj lecionoj gvidataj de L. Schoutens kaj s-inoj Schoutens, Alberti kaj Bär. Kristnaske 1938 la protestanta radio-elsendo VPRO (Vrijzinnig Protestantse Radio Omroep, liberala protestanta radio-elsendejo) uzis siajn 14 minutojn (22a11-22a25) por kristnask-mesaĝo en E-o kaj la nederlanda, kun muzika interludo (*Bataviaasch nieuwsblad* 1938).

### 3. Kursoj en lernejoj

En januaro 1927 Kyftenbelt instruis Esperanton al klaso de 34 lernantoj de Hoogere Burgerschool (HBS) en Surabaya. La kurso estis nedeviga kaj okazis unu fojon semajne. Kiam Kyftenbelt forlasis la urbon, H. Jansen transprenis la kurson.<sup>15</sup>

*La Neŭtrala Eŭropa Baza lernejo en Batoe (1935-1938)*

J.F.L. Lumaye Schuld kaj lia edzino J.P. van Gulp malfermis en februaro 1932 privatan neŭtralan eŭropan bazan lernejon en Batoe (Orienta Javo). Ĝi estis la unua lernejo tie kaj havis multe da sukceso. Li komencis kun 5

---

<sup>14</sup> *Soerabaijasch handelsblad* (1935).

<sup>15</sup> *De Indische Courant* (1927a, 1927b).

lernantoj, sed la nombro de lernantoj rapide kaj daŭre kreskis kaj jam en la sama jaro li havis 50 lernantojn. Ili devis dungi trian kaj poste kvaran instruiston. En 1934 aldoniĝis ankaŭ klaso por etuloj kun aparta instruisto. Ĝi ja nomiĝis eŭropa lernejo, sed ĝi akceptis ankaŭ ne-eŭropajn lernantojn, kvankam la du grupoj ne iris en la sama momento al la lernejo: la eŭropanoj venis matene kaj la „ĉinoj kaj indiĝenoj” posttagmeze.<sup>16</sup> Ĉe la komenco de la nova lernojaro en aŭgusto 1935 la lernejestro povis ĝoji pri tio, ke denove kreskis la lernantaro: estis nun jam 71 lernantoj kaj 10 etuloj. En raporteto pri la unua semajno de la lernojaro oni anoncis, ke la lernejo estas la unua baza lernejo en la lando, kie oni instruas E-on. La prognozo estis, ke post du jaroj ili povos bone esprimi sin pere de tiu lingvo. La estro esperis, ke ili tiel lernos lingvon, per kiu ili povos kompreniĝi en plejparto de la landoj, dum E-o ankaŭ estas granda subteno ĉe la studo de la modernaj lingvoj.<sup>17</sup> La lernejo havis bonan sukceson, kaj devis pligrandiĝi por povi akcepti ĉiujn lernantojn. Fine de decembro 1937 tiu lernejo estis finkonstruita. Antaŭ kaj post la oficiala malfermo la 8-an de januaro 1938 la konstruaĵo estis laŭdata en la gazetaro. Oni aldone konstruis ankaŭ internulejon, kiu ricevis la esperantan nomon *Nia hejmo*.<sup>18</sup> Pri la nova lernejo kaj precipe pri la fakto, ke oni instruas Esperanton tie, oni sciigis eĉ en regionaj nederlandaj gazetoj.<sup>19</sup> Nur kelkajn monatojn poste, almenaŭ jam komence de majo, Lumaye Schuld subite ekloĝis en Prigen (Orienta Javo).<sup>20</sup> Ŝajne la kialo estis lia dua edziĝo en majo 1938. Lia unua edzino, J.P. van Gulp, iĝis direktorino. Kvankam ŝi havis bonan sukceson kaj jam jaron poste denove povis pligrandi la lernejon, en 1941 ŝi transdonis la lernejon al la registraro, kaj tiel la privata lernejo iĝis ŝtata.<sup>21</sup> Ni trovis neniujn indikojn, ke ŝi daŭrigis la Esperanto-instruadon.

### *Diversaj mezlernejoj*

Meer Uitgebreid Lager Onderwijs (MULO, pli disvastigata bazlernejo), Yogyakarta (1933): laŭ raporto pri OCEO (Orientinduja Centra Esperanto-

---

<sup>16</sup> *De Indische Courant* (1926, 1932a, 1932b, 1935a, 1935b), Lumaye-Schuld (1933).

<sup>17</sup> *De Indische Courant* (1935c).

<sup>18</sup> *De Indische Courant* (1937b, 1938a), *Nia Organo* (1938a), *Soerabajasch handelsblad* (1937b, 1938a).

<sup>19</sup> *Breskense Courant* (1938), *Vlissingse Courant* (1938).

<sup>20</sup> *De Indische Courant* (1938c).

<sup>21</sup> *De Indische Courant* (1939, 1941).

Organizo) en *La Praktiko*, en Yogyakarta en 1933 komenciĝis kurso en MULO-lernejo kun 175 partoprenantoj.<sup>22</sup> Ni ne trovis pliajn informojn pri tiu kurso.

Malangsche Handelsschool (1937): J. van der Bent estis sekretario de la Malangsche Esperanto Club kaj instruisto pri librotenado en la faka lernejo pri komerco, Malangsche Handelsschool. En aŭgusto 1937 li komencis instrui Esperanton en ĝiaj plej altaj tri klasoj, kiuj kune havis 75 lernantojn.<sup>23</sup>

Meer Uitgebreid Lager Onderwijs (MULO), Cheribon (1938): K. Gorter en septembro aŭ oktobro komencis kurson en la MULO-lernejo de Cheribon kun 100 lernantoj. Sekvajare komenciĝis nova kurso en la sama lernejo.<sup>24</sup>

#### 4. Provoj enkonduki Esperanton oficiale en la lernejoj(n)

Multaj esperantistoj en Nederlanda Hindio estis instruistoj. Kompreneble ili provis enkonduki Esperanton ankaŭ oficiale en la lernejojn. Prepare al la jarkunveno de la *Nederlandsch-Indisch Onderwijzers-Genootschap* la lokaj sekcioj kutimis kunveni kaj preparoli proponojn diskutendajn dum tiu jarkunveno. En la jarkunveno de 1928 en Surabaya la propono de Malang tekstis: „La N.I.O.G., rekonante la grandajn avantaĝojn, kiujn ĝi kiel internacia helplingvo proponas super vivanta lingvo, provas kiel eble plej rapide realigi ĝian enkondukon en la lernejojn, komencante kun la lernejoj por instruistoj kaj la lernejoj de pli alta edukado” kaj tiu de Surabaya: „La N.I.O.G. faru deklaron pri la dezirindecon, ke ĉiuj instruistoj lernu E-on, tiel, ke kiel eble plej rapide oni povas fari proponojn al la registaro pri ĝia devigata enkonduko en la lernejojn”. Ambaŭ proponoj estis akceptitaj kun granda plimulto, tamen sen sekvoj.

En jarkunveno de decembro 1937 en Batavia, oni la 28-an de decembro sen multe da debato alprenis la proponon de Malang, en kiu ĝi petis, ke la estraro de NIOG pristudu la eblecon de enkonduko de Esperanto en la mezlernejoj,<sup>25</sup> sen plipezigo de la lernoplano ĝenerale.<sup>26</sup> La sekcio de Malang estis petita

---

<sup>22</sup> *La Praktiko* (1933).

<sup>23</sup> *De Indische Courant* (1937a), *La Praktiko* (1937), *Nia Organo* (1937a), *Soerabaijasch handelsblad* (1937a).

<sup>24</sup> *Nederlanda katoliko* (1939), *Nia Organo* (1938b, 1939).

<sup>25</sup> Ili celis kaj la MULO-lernejojn kaj la postaj, veraj mezlernejoj.

<sup>26</sup> *De Indische Courant* (1937c), *Soerabaijasch handelsblad* (1937c, 1937ĉ).

kunmeti Esperanto-komisionon.<sup>27</sup> La e-istoj rajtis ekspozicii esperantaĵojn en la kunvenejo.<sup>28</sup>

Ankaŭ la katolikaj instruistoj kunvenis en la sama periodo kaj ricevis proponon el Malang. La *Katholieke Onderwijzersbond* (Katolika Ligo de Instruistoj, KOB), rivalo de la neŭtrala NIOG, ne akceptis la proponon enkonduki E-on en la MULO-lernejojn kaj la lernejojn por instruistoj, ĉar tio tropezigus la lernoplanon. En decembro 1938 K. Gorter verkis longan artikolon pri la propono de Malang, akceptita dum la jarkunveno de NIOG en decembro 1937. Li verkis tion nome de la komisiono kunmetita de la sekcio Malang (vidu supre). Plej probable ili kune pridiskutis kaj kunmetis la tekston dum la jarkunveno de la instruistoj de Nederlanda Hindio, kiu okazis en tiu monato. La dupaĝa artikolo, aperinta en januaro 1939, celis montri la dezirindecon de la enkonduko de Esperanto en la mezlernejojn, kaj kiel tion fari sen plipezigi la lernoplano ĝenerale. Laŭ li, plej efike estus, se oni anstataŭus en la unua duonjaro de la unua klaso ĉiujn fremdajn lingvojn per E-o. Sed sufiĉus, se oni en la MULO-lernejoj anstataŭus dum la unua jaro unu horon de la angla kaj unu horo de la germana, kaj en la HBS-lernejoj anstataŭigus ĉiu-semajne unu horon de unu el la modernaj lingvoj. Kvankam ne estis parto de la laboro de la komisiono, li tamen fine rimarkigas, ke plej racie estus enkonduki E-on en la lernejoj por geinstruistoj, kaj tiel estonte ĉiam havi sufiĉe da fortoj por la instruado de E-o. Due li rimarkigas, ke jam estas ekzamen-komisiono, kiu konsistas el diplomitaj E-instruistoj, kiuj rajtas disdoni diplomojn por E-instruado.<sup>29</sup>

En la jarkunveno de *Nederlandsch-Indisch Onderwijzers-Genootschap* en Cheribon la sekcio de tiu urbo proponis: „La estraro petu la direktoron de la departemento *Onderwijs en Eeredienst* enkonduki E-on kiel nedevigan fakon en la MULO-lernejojn, kaj en la mezlernejojn kaj kiel fakon en la lernejoj por instruistoj kaj instruistinoj.” La propono estis rifuzita malgraŭ pledoj el pluraj sekcioj. En 1940, okaze de la forigo de la germana el la lernoplano, okazis refoja pledo enkonduki E-on en la lernejoj, sed sen sekvoj.

---

*NdlR: leganto, kiu deziras trovi la abundajn fontojn de tiu artikolo, ekrilatu kun la aŭtorino aŭ vizitu la hejmpaĝon ilei.info.*

---

<sup>27</sup> *De Indische Courant* (1938b), kiu citis *De School*.

<sup>28</sup> *Nia Organo* (1938a).

<sup>29</sup> Gorter (1939).

# Tute nova situacio

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

En majo 2015 aperis komputilprogramo, kiu ebligas, uzante la anglan lingvon, lerni E-on. Temas pri [www.duolingo.com](http://www.duolingo.com). De majo ĝis novembro dum 6 monatoj eklernis nian lingvon 200 000 personoj. 1 000 aliĝas ĉiutage kaj 150 finas la kurson ĉiutage. Ne ĉiuj estas anglalingvanoj, sed ĉiuj havas bazajn konojn de ĝi por uzi la programon. En prilaboro estas kurso por lerni Esperanton surbaze de la hispana lingvo.

En Facebook (FB) estas paĝo „*Duolingo Esperanto Learners*”, kie tiuj lernantoj povas esprimi sin kaj fari demandojn. Sekvas tiun paĝon proksimume 3 000 personoj. Same mi sekvas ĝin, ĉar tio estas tre interesa paĝo. Ni danku al Ruth KEVESS-COHEN (Usono) kaj Chuck SMITH (Germanio) pri ilia laboro en la verkado de la softvaro kaj gvidado de tiu valorega paĝo.

En tiu paĝo aperas la angla lingvo kaj iom da E-o, en foje amuza mikso. Iu grumblis kontraŭ tiu krokodilado, tamen tuj venis reago, ke la komencantoj havu la rajton libere esprimi sin en la punta lingvo de tiu programo.

*Kion ni ekscias legante tiun FB-paĝon?*

Multaj el ni demandas sin, kiel kaj kial tiuj multaj homoj subite eklernas nian lingvon kaj ĉu ni sukcesus, sukcesos, altiri ilin al la movado. Pri tio ni ne multe ekscias en tiu paĝo.

Venas demandoj pri gramatiko, venas respondoj de plej diversaj esperantistoj, foje akademianoj, foje iuj el ni. Aperas diversaj manieroj klarigi, aperas diversaj formoj por unu frazo, abundas bunteco.

Venas demandoj pri vorto. Venas respondoj, denove variaj. Demandu samideanojn el Japanio, Brazilo, Portugalio, Togolando kaj Rusio pri „manĝaĵo”, „viola koloro”, „seкто”, „akurateco”, „demokratio”, „pureco”, kaj vi tuj vidos grandajn diferencojn en niaj konceptoj. La uzo de komuna lingvo ne forviŝas niajn diferencojn; feliĉe ne.

Venas demandoj: kiel mi diru tion en E-o? Venas multaj proponoj, E-lingvaj frazoj ŝprucas. La scivolemulo vidas la variajn eblojn de nia lingvo. La demandanto ankaŭ povas malkovri, kie situas en la mondo tiuj esperantistoj, kiuj intervenas en la paĝo.

Venas esprimo de bezono: mi deziras esti en kontakto kun homoj. Du manieroj aperas; la unua: kiu pretas skajpumi kun mi (mi loĝas en .... horzono.... kiam vi estus libera por babili kun mi....); la dua: kiu loĝas en la regiono .... ĉu ni povas renkontiĝi..... Tiam ni malkovras la situon de tiuj lernemuloj. Ili estas en anglalingvaj landoj sed ne nur. Tiam ni konstatas, ke rekta babilado havas sian valoron, ke respondado al enkomputilaj demandoj ne centprocente kontentigas lernantan homon. Ni lernas novan lingvon por kapabli komuniki, ĉu ne? El tio ni povas dedukti, ke niaj lokaj renkontiĝoj, naciaj kunvenoj, universalaj kongresoj havas estontecon. Nia nova tasko estas organizi niajn renkontiĝojn tiel, ke tiuj novaj uzantoj de la lingvo trovu plezuron kaj pli kaj plu agadu kun ni por konigi nian lingvon, subteni ĝian lernadon kaj labori per ĝi al tutmonda paco.

## Instruado per Duolingo en Slovenio

de *Peter GRBEC (Slovenio)*

Mi estas instruisto kaj ekde septembro mi donas kurson pri Esperanto en mia bazlernejo en Koper (Slovenujo). Mi instruas Esperanton al dudek lernantoj, kiuj estas dek unu jarojn aĝaj, per tableto uzante la programon „Duolingo”.

Jen la retpaĝo de Duolingo: <https://www.duolingo.com/>



Mi instruas Esperanton ĉiusemajne unu horon kaj ĉiun semajnon mi havas pli da lernantoj. La lernantoj estas tre motivitaj, ĉar ili uzas tabletojn kaj konkurencas unu kun la alia (Duolingo ebligas, ke la lernantoj iĝu amikoj inter si kaj la lernantoj povas vidi, kiom da poentoj gajnas iliaj amikoj. Ankaŭ mi faris konkuradon por la lernantoj kaj la ses plej diligentaj lernantoj ricevos libron de fabeloj en Esperanto. La donanto estas la Slovena Esperanto-Ligo.

Kiaj estas la profitoj lerni Esperanton uzante la anglan lingvon? (oni povas lerni E-on ĉe Duolingo nur uzante la anglan) La gepatra lingvo de la plejmulto de la lernantoj estas la slovena lingvo. La lernantoj uzante la programon „Duolingo” devas pensi en tri malsimilaj lingvoj samtempe kaj pro tio ilia cerbo devas ekfunkcii rapidege... La lernantoj nun komprenas pli bone la anglan ol antaŭe. La lernantoj eklernis la anglan lingvon sepjaraĝaj, sed la plejmulto de la lernantoj lernas ĝin parkere, ne komprenante bone, kiel

la angla lingvo funkcias. Uzante la vojon Duolingo, mi asertas, ke uzante E-on kiel regulan lingvon, ili pli bone komprenas, kiel funkcias la angla lingvo kaj samtempe ili lernas E-on.

La lernantoj lernas tute solaj. Ili devas solaj kompreni la regulojn. Mi helpas al ili nur, se ili petas min. Do cerboj funkcias tre rapide... Laŭdinda afero estas ankaŭ, ke la studentoj venas dek ĝis kvindek minutojn antaŭ la komenco de la kurso, helpas min prepari ĉion, kaj komencas lerni solaj antaŭ la komenco de la kurso, kaj kiam la kurso finiĝas, ili ne volas iri hejmen. Mi aŭdis ilin priparoli irante hejmen: „Pluvas, mi ludos E-on per mia tablojdo hejme unu horon”. Rimarkinde estas, ke la lernantoj ludas uzante Duolingo por lerni E-on. Duolingo ebligas al mi kiel instruisto, ke mi povas vidi, kiom ili lernis hejme. Surpriza afero estas, ke pli ol duono de la lernantoj lernas E-on sola hejme laŭ sia propra volo. Do ili pensas, ke ili ne lernas malinteresan fremdan lingvon, sed ke ili ludas per nova ludilo. Ili ludante lernas. Kia bela afero!

### **Rezultoj de enketo de Peter Grbec en Slovenio**

La respondoj aperas jene:

*A = mi tute konsentas*

*B = mi konsentas*

*C = mi ne povas decidi*

*D = mi ne konsentas*

*E = mi tute ne konsentas*

Unua demando: lernado de Esperanto per tabuleto kaj Duolingo amuzas min.

9 lernantoj diras A. 3 lernantoj diras B. 1 lernanto diras C. Neniu lernanto elektas D, E.

Dua demando: mi preferas lerni Esperanton per lernolibro kaj kajero.

1 diras JES. 12 diras NE.

Tria demando: mi volas lerni ankaŭ aliajn lingvojn per Duolingo.

10 lernantoj respondas A. 0 lernanto respondas B. 2 lernantoj diras C. 1 lernanto diras D. 0 lernanto diras E.

Kvara demando: mi kredas, ke, ĉar mi lernas Esperanton per la angla, mi pli bone komprenas la anglan.

8 lernantoj respondas A. 3 lernantoj respondas B. 1 lernanto respondas C. 1 lernanto respondas D. 0 lernanto respondas E.

Kvina demando: Esperanto estas facila lingvo por lerni.

7 lernantoj respondas A. 3 respondas B. 3 respondas C. 0 respondas D, E.



Sesa demando: ĉu vi lernus Esperanton en la jaro 2015/2016, se ĝi estus deviga elektebla lernobjekto?

12 lernantoj respondas JES. 1 lernanto respondas NE.

Sepa demando: kion vi plej ŝatas, kiam vi lernas Esperanton per tabuleto kaj Duolingo. Elektu nur unu eblon.

A: ke mi uzas tabuleton (2 lernantoj elektas A)

B: ke mi estas konstante aktiva (2 lernantoj elektas B)

C: ke mi povas mem elekti la rapidecon de mia progreso (0 lernanto elektas C)

D: ke la instruisto nenion klarigas kaj ke mi sola malkovras la aferojn (5 lernantoj elektas D)

E: ke la instruisto helpas min nur, se mi petas (3 lernantoj elektas E)

F: ke mi povas konkuri kun aliaj lernantoj (1 lernantoj elektas F)

G: mi preferas lerni fremdan lingvon per lernolibro kaj kajero (0 lernanto elektas G)

Leginte tiun enketon de kolego Grbec, ni instruistoj devas serioze rekonsideri niajn kutimojn..... do ek al renovigo de nia instruado!!! (*M. Grosjean*)

## El la landoj kaj sekcioj...

### Francio

#### PRINTEMPaS en la franca Esperanto-Kastelo GREZILJONO

La franca kulturcentro Greziljono organizas sian kutiman staĝon PRINTEMPaS kun intensivaj lingvokursoj sekvataj de KER-ekzamenoj, inter la 10a kaj 17a de aprilo 2016. La tri gradojn gvidos Radojica PETROVIĆ el la serba urbo Ĉaĉak, Marion QUENUT kaj Christophe CHAZAREIN el la franca urbo Tuluzo. Grupo de junulinoj el la suditala Kalabrio venos inter la 17a kaj 23a de aprilo por lerni E-on kaj turismumi. Greziljono invitas aliajn gejunulojn renkonti ilin por komune amuziĝi ĉu komplete ĉu parte per E-o. La franca koruso *Interkant'* kunvenos de la 20a ĝis 24a de aprilo por prepari internacian projekton kaj precipe por kantadi sub gvido de la bulgara kaj franca korusestrinoj Zdravka BOJĈEVA kaj Maja MÉRIAUX. Vidu la kompletan programon rete: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo).

*Bert ŜUMAN, <bert.schumann@gmail.com>*

## Esperanto por malfermiĝi al la mondo

*Kial Kheira, profesia gvidantino por 7-11-jaraj infanoj, uzas Esperanton en sia pedagogia projekto?*

Kheira estas profesia aganto por infanoj en ludejo por postlerneja tempo (apudlerneja ludejo) en la vilaĝo Finhan (Tarno kaj Garono, Francio). Menciindas, ke ŝi estas enmigrintino.

Ŝi ne aparte interesiĝis pri E-o, sed ekkonis Daniel, entuziasman e-iston, kiel vicprezidanton de la asocio de popola edukado de tiu departemento, kiu lertigas la profesiajn akompanantojn de la infanoj. Daniel estas respondeculo pri la rajtoj de la infanoj, pri astronomio kaj pri Esperanto kaj jam kreis dekojn da Esperantlingvaj tabloludoj libere elŝuteblaj el lia retejo: <http://reseauesperanto82.jimdo.com/telechargements/>

Fundamente la teamo de la gvidantoj konstatis, ke la infanoj kondukas inter si kun agresemo kaj defendemo: insultoj, koleraj gestoj, sento esti agresata ... La pedagogia hipotezo de la instruista teamo estas, ke kolektiva kreado de rakonto en bildstrio estus rimedo por ebligi al la infanoj esprimi sin pri ĉiutagaj okazintaĵoj rilate rasismojn, defendemon kaj malĝentilecon.


Tiu projekto ankaŭ preparas partoprenon al festivalo de porinfanaj libroj en majo 2016 en la urbo Montalbano (Montauban, Francio). La ĉi-jara temo estas „Kunvivado”.

*Kial plani sendi bildstriojn en Esperanto al infanoj en la mondo?*

Kheira pensis: en kiu lingvo la herooj de la rakonto povus paroli, por ke estu universala lingvo, egalrajtiga lingvo en la senco, ke ĝi apartenu al neniu preciza popolo? Lingvo, kiun oni lernus ne por konkursi sur la estonta profesia kampo, sed por iri renkonte al la aliuloj? La rolo de E-o evidentiĝas.

*„Por komuniki kun la infanoj de la mondo”*

Dank' al Daniel Lacroze, Marty Kheira konatiĝis kun Françoise (Fransoazo), kiu parolas Esperanton kun siaj 3 gefiloj jam de 23 jaroj. Kiam ŝi estis instruistino, ŝi jam realigis lernojaran leterinterŝanĝon en Esperanto kun sia klaso de 11-jaraj gelernantoj kaj klasoj de 21 landoj. Do ŝi peros la sendon de la realigota desegnita libro al grupoj da infanoj en la mondo. Fransoazo veturados al la vilaĝo de la grupo por inici la infanojn al Esperanto, sed komence ŝi „nur” serĉis grupojn da infanoj, kiuj ŝatus ricevi bildstrian libron verkitan de infanoj en Esperanto.



*Daniel montras la japanajn fabelojn*

La propono estas interŝanĝi foton de la grupo, eble perskajpe renkontiĝi, sed unue esprimi deziron ricevi la sendotaĵon. Fransoazo rete peras la komunikadon kun la respondintaj ĝeinstruistoj disaj en la mondo, tradukas la retmesaĝojn en la francan kaj Kheira rakontas kaj montras al sia infana grupo la novajn kontaktojn, kiuj anonciĝadas. La gepatroj de la infanoj entuziasme reagas.

Aparte interesa estis la surpriza ricevo de fabeloj rakontitaj kaj ilustritaj de japanaj infanoj. Daniel tuj printis kaj plastigis ilin, por ke la infanoj havu ilin enmane. Surprize alvenis pakaĵo de infanaj libroj kaj vortaroj, sendita de usona profesoro, donace al la infanoj kaj iliaj gvidantoj. Jes! Plie la direktorino de la socia ludejo konsilis al alia profesia gvidantino de la teamo, Cyndie, same ligi sian projekton al tiu de Kheira uzante Esperanton!

La pedagogia projekto de Cyndie estas verki novan tekston por nuntempe fama kanzono. Okazos infanaj kantadoj por regiona kampanjo, kies temo

estas „Ne malŝparu nutraĵon”. Iun tagon ŝi telefonis al Fransoazo por peti esperantigon de la refreno de la kanzono.

### *Mondcivitanoj!*



Kaj jam niaj infanoj malkovras, ke ili estas civitanoj de la mondo. Ili lokis la fotojn de siaj korespondantoj sur granda ĉemura mapo kaj surrete esploris pri ilia lando [vd *surfote*]. Tuj ili faris rimarkojn pri la vivnivelo de iuj kompare kun tiu de la aliaj. Ili malkovras diversajn fremdajn nomojn kaj aliajn manierojn lerni, ekz. ekstere sub libera ĉielo. Jam infanoj el pli ol 20 landoj respondis al ili, kiuj atendas la bildstrian rakonton en E-o pri la temo „eduko por paca kunvivado”.

Kaj jam alia projekto aldoniĝis al tiu unua: kantigo de la grupo de la kolegino Cyndie. Jam la infanoj verkis la novajn frazojn en la franca, Fransoazo tradukis la refreton en Esperanton kaj perrete sendis la precizan prononcon al la gvidantino.

Tria projekto ĝermas en la kapo de Fransoazo... filmi la 2 grupojn kaj sendi la filmon al niaj geamikoj de la mondo por surprize saluti ilin en E-o! Kaj sendi la filmon al la centra oficejo de la popoleduka asocio en Parizo. Intertempe nova defio subite aperas kaj kolizias kun la unuaj du: Daniel estas petata instali budon kaj deĵori, por ke E-o montru sin al la publiko en la tre baldaŭ okazonta salono de edukado por neperforto en la granda kongresejo Eŭritmio („Eurythmie”) en la urbo Montauban. Li instalos grandan panelon kun afiŝoj por montri la mirindan projekton en la vilaĝo Finhan (jes, ĉar jam

la geinstruistoj de la lernejo montris intereson kunlabori kun Kheira.) Li tiel montros, kiel vivas E-o kaj kiom ĝi utilas por eduko al neperforta kunvivado, kaj li tiamaniere eble allogos aliajn edukistojn, esperas Fransoazo!

Ni la plenkreskaj volontuloj, Daniel kaj Fransoazo, nutras en nia sino la esperon, ke la publiko kaj la ŝtataj responsuloj en Francio rimarkos, ke Esperanto havas edukan valoron, aparte por malfermi la infanojn al la mondo, larĝigi ilian menson kaj fortigi ilian toleremon. Kresku tiu projekto kiel juna arbo, ĝi estu radikoj de paco en la tero!

*Françoise NOIREAU*

## Hungario

### Laborkunsidoj paralelaj



La trian semajnfino de septembro 2015 hungaraj membroj de ILEI gastigis du estraranojn de ILEI. Mireille GROSJEAN, nia prezidantino – laŭ la invito de Marta KOVÁCS – venis al la urbeto Nagymaros (ĉ. 50 km norde de Budapeŝto). Ŝi povis persone konatiĝi kun la redaktoro de IPR kaj faris intervuon kun li por *Muzaiko*. Krome, la 19-an de septembro ni havis laborkunsidon. Jen la partoprenantoj (*sur la foto de maldekstre*): Marta KOVÁCS (gastiganto), Palma CSISZÁR SALOMON (estrarano de ILEI-HU) (*nur iomete videble*), Mireille GROSJEAN, Maria SOPONYAI, Jozefo NÉMETH (redaktoro de IPR), Veronika POÓR (estonta Ĝenerala Direktoro de UEA), Stefan MACGILL (Vicprez. de UEA). Temoj pritraktitaj: Jaro de Lernanto –

Estontaj ILEI-konferencoj kaj UK-oj – UK en Afriko – retejoj de ILEI – revuo *Esperanto*. En apartaj interparoloj, Mirejo kun Jozefo parolis pri IPR kaj kun Palma kaj Jozefo pri la sekva ILEI-Konferenco.

La saman semajnfinojn Radojica PETROVIĈ, estrarano de ILEI pri konferencoj, laŭ la invito de Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ vizitis nian sekva-jaran konferencurbon Nyíregyháza. Ili laboris tri tagojn longe, la kunsidon ĉeestis ĉiuj 8 LKK-anoj (eĉ se ne ĉiuj samtempe). Okazis traktadoj kun la vicestrino de la kancelierejo (la kanceliero estas la ĉefdirektoro pri la ekonomiaj aferoj en la Altlernejo). Oni konstatis, ke estas interkonsento pri pluraj farenadaĵoj. La kunsidantoj vizitis ankaŭ la Altlernejon kaj Radojiĉa eĉ elprovis unu el la ĉambroj, kie loĝos la konferencanoj.  
*(Du pliajn fotojn vidu dorskovrile).*

*Jozefo NÉMETH*

## **Kanado**

**Dorothy E „Kim” KEEBLE (1925.06.10 - 2015.10.27).**



Dum multaj jaroj Kim partoprenis esperantistajn agadojn en Nov-Skotio kaj, antaŭ 30 jaroj, en Brita Kolumbio. Ŝi ĉeestis Universalajn Kongresojn en Vankuvero (1984) kaj Havano (1990). Ŝi korespondadis kun samideanoj ĉirkaŭ la mondo kaj restis UEA-delegito por Dartmouth, Nov-Skotio, Kanado. Ŝi konis multajn esperantistojn tra Kanado kaj Usono. En 2001 la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) nomis ŝin Honora Membro.

Kiel daŭra membro de ILEI, ŝi ĉefe interesiĝis pri la instruado de Esperanto. Multajn ek-lernantojn (kiel mi) ŝi zorge gvidis ĝis sukceso tra la malnova perpoŝta kurso. Dum jaroj ŝi volontulis en lokaj lernejoj por instrui gestudentojn pri Esperanto, kaj ŝi multe fieris pri la sukcesintoj. Ĝis la morto ŝi instruis infanojn de geamikoj pri nia lingvo.

Ni ĉiuj multe sentos la mankon de ŝi.

*Bob WILLIAMSON*

## **Kroatio**

### **Kroataj kantoj en Vroclavo**

La 16-an kaj 17-an de majo en Vroclavo, Pollando, okazis la tria Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Ĉi-jare partoprenis ĝin la koruso „Gajuletoj” el la elementa lernejo Davorin Trstenjak el Zagrebo, Kroatio. Al Vroclavo vojaĝis 25 membroj de la koruso kun siaj gvidantoj: instruistino Silvija Fostač, akompanantino Mia Fostač kaj el la Dokumenta Esperanto Centro, Josip Pleadin. La vojaĝon organizis Unuiĝo de Prelegantoj de E-o (ILEI-sekcio Kroatio), kies prezidantino Marija Jerković ankaŭ partoprenis la festivalon. La vojaĝon subvenciis la zagreba urba oficejo por edukado, kulturo kaj sporto kaj helpis la direktoro de la elementa lernejo Davorin Trstenjak. La partoprenreguloj estis, ke ĉiu kantgrupo prezentu du kantojn: unu en E-o kaj la alian en la nacia lingvo. Gajuletoj prezentis „Girlandon de la kroataj naciaj kantoj” kaj en E-o kaj en la kroata lingvo. Sur la festivala scenejo prezentis sin kaj esperantistoj kaj neesperantistoj.

Kelkaj el ili montris la altan kvaliton, sed oni ne rajtas apartigi iun kantiston aŭ koruson, ĉar la grupoj kaj solistoj estis tre bonaj. Ilia prezentado signifis grandan elpaŝon el la esperantista rondo al la pli vasta neesperantista publiko en pozitiva senco.

La Festivalon organizis Centro de Interkultura Edukado – Regiona Buroo Vroclavo kune kun Vroclava Centro de Pliiĝuloj. La festivalo estis tre sukcesa. Gajuletoj vizitis belan gotikan-barokan urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Ili konatiĝis kun multaj gelernantoj el Pollando. Ili vidis, kiel funkcias la internacia lingvo kaj samtempe prezentis sian landon en Eŭropo.

Kiel videblis sur la vizaĝoj de kandidatoj, la Festivalo estis ĝuinda de la komenco ĝis la fino. Ni vidis, ke muziko kaj Esperanto povas kunigi homojn el diversaj kulturoj kaj landoj.

*Marija JERKović*

## **Pollando**

### **Riĉa septembra programo en Poznano**

Fine de septembro la Esperanta vivo en Poznano vigliĝas pro la universitata interlingvistika sesio (en UAM) kaj la kultura festivalo Arkones. La kunordigo de la du aranĝoj jam de jaroj montras bonajn rezultojn. Arkones proponas riĉan kulturen programon: viglaj muzikkoncertoj, interesaj spektakloj kaj filmoj, atentokaptaj prelegoj kaj ludoj amuzas la partoprenantojn. Aliflanke la prelegantoj kaj kelkaj partoprenantoj de la



interlingvistika sesio kontribuas al la programo. Ĉi-foje prelegis Vera Barandovska-Frank (pri slavaj planlingvoj), István Ertl (pri Beletra Almanako, Spritaj splitoj kaj preskeraroj), Nicolau Dols (pri la kulturo de Majorko), Zbigniew Galor (analizis la problemojn el la libro verkita kun Jukka Pietiläinen „*UEA en konscio de Esperantistoj*”), Aleksander Korĵenkov (pri kongresaj paroladoj), Tomasz Chmielik (pri la antaŭmilita juda mondo; li prezentis la novan „*Historion de Esperanto-literaturo*” kaj kun István Ertl la tradukitan poemvolumon de la pola Nobelpremiito Wisława Szymborska) kaj Michael Farris (pri la anglalingva industrio). El la kursanoj Fernando Pita prezentis la libron pri la kulturo kaj lingvo de la tupioj, Suso Moinhos (la galegan literaturon), Rafael Zerbetto (la brazilan verkiston Guimarães Rosa), Felix Jimenez Lobo (malnovan retrovitan E-filmon), Johano Derks (falsajn eŭropajn amikojn) kaj Michael Kozicki (fervojjajn muzeojn). Speciala evento estis la prezento de la libro „*Kiel dono de la mano*”, poemoj de polaj poetoj, esperantigitaj far Lidia Ligeża, kun partopreno de poetoj kaj kunlaboro de kelkaj gestudentoj de la Studoj.



La studsesio (19-25.09.2015) estis same riĉa. Dr Marc Bavant (eksstudento de la Studoj) kun Ilona Koutny skizis la sintakson de Esperanto, Michael Farris enkondukis la gestudentojn en leksikologion kaj semantikon. Prof. Vera Barandovska-Frank daŭrigis la temon de planlingvoj kaj István Ertl prelegis pri la tria periodo de esperanta literaturo. Alvenis ankaŭ prof. Melnikov kaj prezentis sian *Gvidlibron tra Esperantio*, krome prof. Nicolau



Dols, kiu gvidis fonetikon antaŭ unu jaro, kaj ĉi-foje prelegis angle en la Lingvistika Instituto de UAM. Post la merkredaj ekzamenoj okazis la komuna vespero kun poemoj kaj kantoj, tio donis eblon renkontiĝi kun lokaj esperantistoj kaj aŭskulti Suzanan (Zuzanna Kornicka), kiu festis la eldonon de sia unua disko „*Malsato de espero*”. La semajno estis neforgesebla ankaŭ dank' al la 20 partoprenantoj el 10 landoj.

*Ilona KOUTNY, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj, UAM  
(Fonto: edukado.net)*

### **Ewa Bondar (1922.08.26 – 2015.10.27)**

Kun tristeco ni informas vin, ke la 27-an de oktobro, en sia hejmo forpasis



Ewa BONDAR, tre konata pola Cseh-instruisto. Ewa BONDAR naskiĝis la 26-an de aŭgusto 1922 en Bjalistoko. Ŝi eklernis Esperanton en sia 60-a jaraĝo kaj tre baldaŭ akiris de Pola Esperanto-Asocio ateston pri instruado. Ewa Bondar partoprenis la Cseh-seminaron, gvidatan de la fama Cseh-instruistino Audrey CHILDS-MEE en 1985 kaj decidis studi kaj apliki la metodon. Post sia fina ekzameniĝo pri la metodo en 1987 ŝi fariĝis kunlaborantino de Mila VAN DER HORST-KOLINSKA, transprenante parte la rolon de la

forpasinta Audrey. Ŝi ne nur kursojn gvidis en multaj landoj sed ankaŭ trejnigis Cseh-metodajn instruistojn kaj plurfoje volontulis farante administrajn laborojn ĉe la Cseh-aranĝoj dum la kongresoj. Ewa BONDAR en 2001 fariĝis Honora Membro de la Internacia Esperanto-Instituto.

*(Fonto: edukado.net)*

## **Rusio**

### **Esperanto dum la pasinta jaro en nia universitato**

*Jen raporteto pri Esperanto-agado dum la pasinta lernojaro 2014-2015 en nia universitato RUDN (Rusia universitato de amikeco inter la popoloj).*

Mallongaj informoj kaj statistiko:

– La 14-an de novembro 2014 en RUDN dum kunsido de la Scienca Konsilio estis akceptitaj du studprogramoj por E-instruado. La sukcesintoj de la kurso ricevas gravajn diplomojn, kiuj estas agnoskataj en Rusio kaj multaj

aliaj landoj. La 19-an de novembro la programoj estis oficiale lanĉitaj.

– La ĉefa programo nomiĝas „Baza kurso de lingvo Esperanto”. Ĝin povas partopreni homoj, kiuj jam havas universitatan aŭ kolegian kleron, aŭ nun studas en universitato minimume la 3-an jaron. Tiu ĉi kurso daŭras 75 horojn (100 t.n. „akademiajn” horojn). Pro tio la kurso estas unu el la plej longdaŭraj E-kursoj en Rusio.

La sistemo nomita Komuna Eŭropa Referencadro pri Lingvoj (KER) en Rusio ne funkcias, ekzistas aliaj gvidiloj por pritaksi la atingojn de lernantoj. Malgraŭ tio, ke en la nomo de la kurso aperas la vorto „Baza...”, se kompari kun KER-sistemo la sukcesintaj kursfinintoj supozeble havas B2-nivelan lingvokonon. Tamen tio ne estas iu preciza komparo, nur tre-tre proksimuma, ĉar la aliroj estas tute diversaj. Sukcesintoj de la duŝtupa ekzameno (skriba kaj parola) ricevas atestilon de federa ŝtata universitato pri aldonaj profesiaj konoj, kiu oficiale estas traktata kiel aldonajo al ilia ĉefa diplomo.

– La dua studprogramo celas lernejanon de la lastaj studjaroj kaj ajnajn aliajn homojn sen universitata diplomo. Ankaŭ ĝiaj finintoj ricevas specialan atestilon.

– Dum la lernojaro 2014-2015 estis lanĉitaj du „fluoj” de 100-hora kurso. Sume ilin partoprenis 9 lernantoj. Meza aĝo de la lernantoj: ĉ. 25 jaroj. Nur unu el ili havas rilaton al RUDN (studas en la filologia fakultato kadre de postdiplomaj programoj). Plejparto de la studentoj jam havas la superan kleron aŭ studas la lastajn jarojn en universitato. La diplomaj fakoj estas tute diversaj: filologio, ekonomiko, medicino, biologio, programado, lingvistiko. 4 jam finis E-kurson, sukcese trapasis la ekzamenon kaj ricevis diplomojn. La aliaj daŭrigas la studadon septembre. 2 kursfinintoj partoprenis la 100-an UK en Lillo. La dekanato de nia fakultato direktis oficialajn salutleterojn al la ĉi-jaraj UK kaj ILEI-konferenco. Dum la kurso okazis du „malfermitaj” lecionoj: de Mikaelo Bronŝtejn (RU) kaj de Kristin Tytgat (BE).

– Krom tiuj du kursoj ni ankaŭ eksperimentis kun senpaga 5-leciona „fulmo-kurso”. Ĝi okazis en nia universitato aŭtune de 2014. Partoprenis sume pli ol 30 lernantoj en 3 grupoj. Sukcese finis la kurson ĉ. 20. Ili ricevis diplomojn, kiujn subskribis la dekanato de filologia fakultato.




*Informas: Dima ŜEVĈENKO*

### Novaj vojoj de lernado

Inter la 17 celoj difinitaj de UN por la daŭropova evoluo dum la periodo 2015-2030 (*Esperanto*, Novembro 2015, p. 230) gravan lokon okupas edukado. Precipe grava por ILEI kiel asocio de edukantoj estas la 4-a celo:

*Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancon por tutviva lernado.*



Tio estas kion ILEI laŭdifine rekte atentis, aŭ devus atenti, en siaj agadplanoj kaj aktivajoj. Ankaŭ la celoj 5 (egaleco inter la seksoj, virinaj rajtoj), 10 (redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj), 16 (konstruado de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭropova evoluo) kaj 17 (realigaj kapabloj, tutmonda partnereco) estas proksimaj al la laŭstatutaj celoj kaj program-orientiĝo de ILEI. La ceteraj 12 celoj de UN, kiuj rilatas al forigo de malriĉo kaj malsato, garantio de sano, akvo, energio, ekonomia kresko, infrastrukturo, batalo kontraŭ klimatsanĝiĝo, prizorgo de oceanoj kaj maroj, protekto de ekosistemoj k.c., ne apartenas al la agadtereno de ILEI. Tamen, la E-komunumo per sia informa agado povas helpi vastan konsciigon pri ilia graveco kaj popularigadon de planoj kaj atingoj de ilia realigado.

### E-lernantoj en la centro de atento

Ni revenu al la *bonkvalita edukado kaj tutviva lernado* el la 4-a celo. Ĝi signifas adekvatajn kondiĉojn kaj rimedojn por lernado, egalece kaj juste alireblajn al ĉiuj bezonantoj. La teknologio, precipe IKT (inform-komunika teknologio), ekipis la modernan pedagogion per potencaj rimedoj por kreado, disponigo kaj uzado de lernmaterialoj. La E-kursoj kaj lernfaciligaj materialoj ĉe, ekzemple, lernu.net, edukado.net kaj duolingo.com montras kiel la pedagogio de E-o akceptas kaj utiligas lern-teknologiajn novaĵojn.

Kun la instrutekologia evoluo, tirante unu la alian antaŭen, evoluis kaj draste ŝanĝiĝis didaktikaj aliroj al la edukado: la roloj kaj interrilatoj de lernanto kaj instruanto ŝanĝiĝis, la interesoj kaj bezonoj de la lernanto estas

en la fokuso, interkultura edukado fariĝis esence grava en la epoko de tutglobiĝo, eksterinsti-tucia kaj neformala kler-iĝo forte evoluis, kaj la tutviva lernado fariĝis konsista parto de la ĉiu-tagita vivo.

Ĉio ĉi signifas *novajn vojojn de lernado*, kiujn prientos la 49-a konfe-rencio de ILEI tra diversaj formoj de la konferenca programo, inkluzive de la



*Interkona frandvespero en Oostende 2015*

*Simpozio pri la konferenca temo*. Konforme al la Jaro de Lernanto, proklamita en la Strategia Laborplano de UEA, la E-lernantoj estos en la centro de atento. La tuta programo estos markita per tiu konferencetema orientiĝo.

## **Faka programo**

La populareco kaj sukceso de la kurso por komencantoj kaj instrutreja seminario dum la 48-a konferenco en Oostende signifas kuraĝigon al ILEI por plivastigo de la konferenca programpropono al E-lernantoj kaj instruantoj: kursoj por komencantoj, komencintoj kaj progresintaj gramatikemuloj, instrutreja seminario kaj seminario pri E-kulturo kaj interkulturo, ĉio en moderne ekipitaj prelegejoj de la Altlernejo de Nyíregyháza.

ILEI precipe alvokos lernantojn de [duolingo.com](http://duolingo.com) kaj [lernu.net](http://lernu.net) por sperti la lingvon ĉeeste en Nyíregyháza. Kaj ILEI invitas siajn agantojn kiuj pretas venigi grupon al iu el la kursoj kaj seminarioj, aŭ mem prelegi, aŭ gvidi diskutrondon aŭ fakgrupon pri iu temo, sciigu tion al la estrarano pri konferencoj por interkonsenti kaj plani konkrete.

## Kultura, distra kaj turisma programo

La tradiciaj *Interkona frandvespero*, *Nacia*, *Internacia* kaj *Adiaŭa vesperoj*, *Lingva festivalo* kaj *Konferenca bankedo* estas siaspecaj identigiloj de la



*Lingva festivalo: la tetuna lingvo el Orienta Timoro (2015-07-21)*

konferencoj de ILEI. La diligenta kaj entuziasma LKK en Nyíregyháza planas aldoni *Konferencan balon* al la vespera programo. Por la junaj konferencanoj kaj ĉiuj kiuj sentas sin junaj, ni planas noktan amikan kaj muzikan programon kaj sportajn posttagmezojn.

Kaj ĉio ĉi, inkluzive de loĝado kaj manĝado, okazos praktike „sub la sama tegmento”, en la komplekso de koridore kunligitaj konstruaĵoj de la Altlernejo, kun multe da spaco por eksterprograma amikumado ene, aŭ ekstere en belega

ĉirkaŭa parko, aŭ en proksimaj tipe hungaraj restoracioj.

La turisma programo per duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj konigos al la konferencanoj la urbon mem, la proksimajn sal-lagan bankuracejon, bestĝardenon kaj etno-vilaĝon, kaj iom malpli proksimajn regionojn de Tokaj kun la famaj vinkeloj kaj regionon kie situas la Muzeo de Kolomano Kalocsay.



*El etnovilaĝa muzeo ĉe Nyíregyháza*

Pliajn informojn vi povos legi en la konferencaj paĝoj [www.ilei.info/agado/konferencoj.php](http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php) kaj en la aparta konferenca retejo de LKK: [ilei2016.nyirenergy.hu/](http://ilei2016.nyirenergy.hu/).

***Bonvenon en Nyíregyháza!***

*Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj*



# Aligilo

por la 49-a Konferenco de ILEI  
Nyíregyháza, 30/07 – 07/08/2016

- Nomoj: Persona(j) \_\_\_\_\_  
Familia(j) \_\_\_\_\_  Ino  Viro  
Naskiĝdato \_\_\_\_\_ Profesio \_\_\_\_\_
  - Lando \_\_\_\_\_ Kodo, urbo \_\_\_\_\_  
Loĝadreso \_\_\_\_\_  
Retadreso \_\_\_\_\_ Telefono \_\_\_\_\_
  - Ĉu vi konsentas, ke via retpoŝtadreso aperu en publika listo de partoprenantoj?  Jes. /  Ne .
  - Mi aliĝas al la konferenco kiel (elektu unu):  
 membro de ILEI,  ne membro,  infano,  junulo.  
 handikapulo,  familiano,  nur-simpozio/unu-du-tage.
  - Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno \_\_\_\_\_ foriro \_\_\_\_\_
  - Mi kotizas \_\_\_\_\_ EUR. (Vidu la kotiztabelon sur la sekva paĝo.)
  - Mi kontribuas \_\_\_\_\_ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j): \_\_\_\_\_
  - Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago de la kotizo kaj mi pagas jene (indiku vian pagmanieron):  
 Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855,  
BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.  
 Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-Konferenco 2016"  
 Ene de Hungario: al bankkonto 68800109-33771706, Szabolcs  
Takarékszövetkezet.
  - Mi  bezonas /  ne bezonas invitilon por peti la vizon.
  - Mi posedas pasporton n-ro \_\_\_\_\_ de la ŝtato \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_ validan ĝis la dato \_\_\_\_\_.
  - Por la Lingva festivalo mi proponas prezenti la lingvon \_\_\_\_\_ .
  - Aliaj kontribuproponoj por la konferenca programo: \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - Aliaj komentoj, sugestoj, proponoj \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_
  - Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn el la Konferenca Regularo, p. 6-9 (ilei.info/dok/regularo\_konferencoj.rtf)
- Loko, dato \_\_\_\_\_ Subskribo \_\_\_\_\_

Viajn aliĝilojn bonvolu sendi paperpoŝte, aŭ la skanaĵon rete, al:

William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono, <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>, kun porinforma kopio al la estrarano pri konferencoj <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>

**Prefere uzu la elektronikan aliĝilon** (la ligilo troveblas ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info)):  
[https://docs.google.com/forms/d/1dBib7HGPxjeIGQAI3oHfON4COOIPz37wvmp9Cr\\_aYsQ/viewform](https://docs.google.com/forms/d/1dBib7HGPxjeIGQAI3oHfON4COOIPz37wvmp9Cr_aYsQ/viewform)

## Kotizoj

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.  
B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 28.02.2016		ĝis 30.06.2016		post 30.06.2016	
Aliĝkategorio:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI <sup>(1)</sup>	60 €	35 €	70 €	40 €	85 €	50 €
Ne-membro	75 €	50 €	90 €	55 €	105 €	65 €
Infano <sup>(2)</sup>	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €
Junulo <sup>(3)</sup> , handikapulo <sup>(4)</sup>	30 €	20 €	35 €	25 €	40 €	30 €
Familiano <sup>(5)</sup>	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozio <sup>(6)</sup>	30 €	30 €	35 €	35 €	40 €	40 €

- (1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2016. Honoraj membroj ĝuas 100%-an rabaton.  
(2) Infano: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1998.  
(3) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1986.  
(4) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.  
(5) Familiano de alia aliĝinto, aŭ akompananto de handikapulo, pagas 50% de la kotizo kiun li aŭ ŝi pagus aliĝante sola.  
(6) Nur-simpozio aŭ unutaga aŭ dutaga partoprenanto.

## ***El la Konferenca Regularo***

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. [...]



# Konferencoj 2017 kaj 2018

## Konkurso por elekto de invitantoj

La Konferenca Regularo de ILEI, punkto 3, preskribas:

*Ĝenerale la Konferencon invitas ILEI-Sekcio aŭ loka Esperanto-organizo kaze de ne ekzisto de Sekcio. La inviton akompanu utilaj informoj pri la Konferencaj ejoj, loĝlokoj, kostoj kaj subvencioj. Al la oficiala invito estu aldonita ekzemplero de ĉi tiu Regularo, subskribita de la invitanta instanco, por atesti, ke ĝi respektos ĝiajn regulojn, se la invito estos akceptita.*

### Alvoko

La Estraro de ILEI invitas sekciojn de ILEI, aŭ aliajn Esperanto-organizojn kunlabore kun la ILEI-sekcio, aŭ memstare se en la lando ne ekzistas sekcio de ILEI, kandidatiĝi por

- invitanto de la jubilea 50-a Konferenco de ILEI planata por la jaro 2017, aŭ/kaj
- invitanto de la 51-a Konferenco de ILEI planata por la jaro 2018.

Detalojn de la konkurso bonvolu legi ĉe *ilei.info*, aŭ vi povas peti kaj ricevi de la estrarano pri konferencoj la kompletan tekston.

Kandidatiĝan leteron, kun esprimita kaj motivita intenco inviti la konferencon, precizigo ĉu vi kandidatiĝas por la jaro 2017 aŭ 2018 kaj aliaj necesaj informoj, bonvolu sendi retroŝte, plej laste ĝis: 31 jan 2016, al la estrarano pri konferencoj:

Radojica PETROVIĆ <[radojica.petrovic.rs@gmail.com](mailto:radojica.petrovic.rs@gmail.com)>

La Estraro de ILEI pristudos la ricevatajn kandidatiĝojn kaj komunikos la rezulton al ĉiuj kandidatoj plej laste ĝis: 20 feb 2016.

Por la Estraro de ILEI,

*Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj*



## Informoj pri ILEI

### Laborkomisionoj

**Ekzamena:** Karine Arakelian (prezidanto), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Monique Arnaud, Synnöve Myntinnen.

**Kontrolo:** Simon Smits, Orlando Raola.

**Laboreja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Ivan Colling, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”.

### Enmovadaj partneroj (entute 14)

**EEU:** *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj  
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.  
Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de*.

**IFEF** (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*.

Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

*kaj aliaj*

### Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

**ALTE** (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

**Unesko** (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

*kaj aliaj*

### Membreco kaj pagado por diversaj servoj

**Membreco kostas 20 € en A-landoj** (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas

donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <[ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com)>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj banko-kostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

\* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

\* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## Redakciaj informoj

---

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <[jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com)>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <[moerbeekr@gmail.com](mailto:moerbeekr@gmail.com)>.

**Ni fermis la nunan numeron la 7-an de decembro 2015,  
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de februaro 2016.**

*Sur la fotoj dorskovrile supre (de maldekstre):* Győző GAÁL, d-rino Erika NAGYNÉ SCHMERZER (estro de la lingvoinstrua kaj ekzamena centro de la Altlernejo), Radojica PETROVIĆ, Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ, Miklós ZUBERECZ en la altlerneja kancelierejo en Nyíregyháza (HU); *malsupre:* Jozefo NÉMETH, Veronika POÓR, Mireille GROSJEAN, Stefan MACGILL, Maria SOPONYAI, Marta KOVÁCS, Palma CSISZÁR SALOMON en Nagymaros (HU) (vd. p. 29)

---

## AMUZE ĈU NE?

*Lingvoinstruisto promenadas laŭlonge de rivero. Pro fortaj pluvoj la akvonivelo estas aparte alta kaj danĝera. Subite aŭdiĝas „Helpu! Helpu!” La promenanto vidas dronantan homon en la rapida akvoŝluo. Li tuj respondas: „Diru tion per kompleta frazo!”*

---



Kroataj infanoj en Vroclavo (vd p. 31)





